3-a Jaro. N-o 142 APERAS  SEMAJNE 18. Junio 1927

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

FOR NACIISMON KAJ RASISMON!

El Suda Afriko

Suda Afriko, oni asertas, estas miniaturo de la tuta mondo pro tio, ke tiu ĉi lando respeguligas interne de siaj landlimoj ĉiujn mondproblemojn malgrandskale.

Tie ĉi ekzistas plej akutforma rasa antaŭjuĝo inter nigruloj kaj blankuloj; nacia malamikeco inter angloj kaj holandanoj ne tute malaperis kaj ne mankas simptomoj por certiĝi pri la ofendiĝo, kiun ankoraŭ sentas multaj boeroj[1]) pro la angla entrudo en ilian politikan sendependecon. Lingva diverseco ankaŭ estas kaŭzo de ĵaluzo inter la du blankaj popoloj kaj, kompreneble, ekzistas neevitebla konflikto de interesoj inter la Proletaro kaj ĝia ekspluatantaro.

Ĉar la blanka raso estas la reganta kaj la nigra — la sklavigita kaj ekspluatata, la malsimileco inter blankuloj kaj negroj alprenas ne nur ekonomian aspekton sed ankaŭ rasan. Ni tiel havas du sociajn klasojn reprezentatajn de du distingeblaj koloroj.

Tiu fakto, kolordiferenco, ebligas al la reganta klaso apartigi la nigrajn kaj blankajn laboristojn. Efektive, la lastaj laboras nur kiel oficistoj kaj kontrolistoj super la indiĝenoj. Eĉ inter la senhavuloj blankaj la kolordiferenco efikas kiel barilo al unueca agado kun nigraj laboristoj kontraŭ komuna malamiko.

Sur la ekonomia kampo ni ankaŭ havas la rapide kreskantan industrian evoluon de la lando, sed restas samtempe la pli malnova formo de socio, la feŭda sistemo de terkulturo, kiu ankoraŭ regas en la ekonomia vivo de la lando.

[1]) Boeroj estas holanddevenaj vilaĝanoj jam delonge enmigrintaj Sudan Afrikon.

Estas do tute nature en tiu situacio, ke pli ol iuj ajn aliaj diferencoj ekzistantaj inter la popoloj de la sama lando, la rasdiferencoj kaŭzas malkaŝajn konfliktojn.

Jen kie boero kaj anglo subigas siajn proprajn diferencojn por solidara kontraŭstaro al la nigra raso en Suda Afriko.

Unu el la plej malbonaj ekzemploj de rasa antaŭjuĝo nun disvolviĝas. Feliĉe ne tia, kia kutime kaŭzas perdon de homaj vivoj, tamen laŭ sia malica karaktero ĝi estas unika eĉ en Suda Afriko.

Ĉe la hospitalo en Mafeking rezignis labori la flegistinoj. Oni demandos eble, ĉu pro salajrmalaltigo? ĉu pro plilongigo de laborhoroj? aŭ eble pro malbonaj laborkondiĉoj?... Tute ne! Ili rezignis, ĉar ili ne plu volas obei la ordonojn de la nigra kuracisto, kiu operacias en la hospitalo la blankajn pacientojn.

La koncernata medicinisto estas indiĝeno, D-ro Molema, kiu antaŭ ol praktiki en Mafeking sin preparis por sia profesio en Glasgow'aj kaj Dublin'aj hospitaloj dum sepjara studado. Li ankoraŭ havas diplomon pri akuŝarto. Li estas ido de unu el la ĉefuloj de la Barolong gento.

Pro lia bonega ĥirurgia lerteco kaj ĉar li iniciateme aplikas la plej modernajn instrumentojn, li estas preferata de la blankaj operaciotoj precipe de virinoj el la distrikto.

Nun la blankaj flegistinoj malŝatas labori sub lia direkto kaj atenti kiam li faras intimajn operaciojn super blankaj virinoj. Strange estas, ke kelkaj el rezignintaj flegistinoj iam mem rekomendis pacientojn al D-ro Molema. La situacio ĉe la hospitalo necerta. Sciante tion aliaj blankaj flegistinoj rifuzas servi tie kaj indiĝenaj flegistinoj nun ne estas haveblaj. Se la administracio ne decidos favore al la flegistinoj, oni timas, ke la hospitalo, kiu priservas la tutan distrikton, devos fermiĝi.

La blanka loĝantaro de Suda Afriko simpatias al la flegistinoj kaj multaj parlamentanoj, eminentuloj kaj medicinistoj sendis al ili simpatiesprimojn. La Sud-Afrika medicina studentaro (!) en Londono sendis gratultelegramon al la flegistinoj "pro iliaj sintenado kaj batalo por «blanka Suda Afriko»".

D-ro Molema intencas procesi por ricevi mil funtojn sterlingajn kiel kompenson.

La afero ne estas loka sed ĝi havas nacian signifon tuŝante gravan principon kaj eĥigante la tutan landon. Jam la direktoraro de la hospitalo en Bloemfontein decidis ne allasi praktiki indiĝenajn kuracistojn en nacia hospitalo de tiu urbo, por eviti similajn okazaĵojn kiel en Mafeking.

En Suda Afriko oni ofte aŭdas de la blankaj regantoj, ke la indiĝenoj ricevos plenajn rajtojn egale kun la blankuloj nur kiam ili atingos sufiĉe altan vivnivelon civilizacian. Sed la afero de D-ro Molema montras la kontraŭon. Ĝi montras, ke la reganta raso neniam deziras levi la indiĝenojn el la koto aŭ plibonigi ilian staton kaj intencas daŭrigi la sklavigadon de la nigra raso ekonomie, politike kaj socie.

La naciismo estas stulta kaj krima; sed ne malpli krima kaj detruinda estas la rasismo!

Trinaŭkvinok.

Semajno el la vivo de Wien'a tramvojisto

En kelkaj numeroj de "S-ulo" mi legis artikolojn verkitajn de Gek-doj, kiuj priskribis tagon el sia vivo. Tiuj ĉi artikoloj tre plaĉis al mi kaj mi esperas, ke de tempo al tempo K-doj el ĉiuj mondpartoj sekvos la ekzemplon, por ke ni povu prezenti al ni vivantan bildon rilate la vivkondiĉojn, klerigajn eblecojn, sporton ktp.

Nun mi volas mem priskribi semajnon el la vivo de Wien'a tramvojisto. Tion mi devas fari, ĉar ja la vivo de tramvojisto estas tre malregula kaj ne sufiĉus, se mi nur priskribus tagon. Mi estas 30-jara kaj depost la mondmilito konduktoro ĉe la Wien' a tramvojo.

Estante la ĉefa transportilo en Wien, la unuaj tramveturiloj jam devas elveturi el la halo je la 5-a, kaj la lastaj enveturi post noktomezo. Kompreneble ne ĉiuj tramvojistoj povas esti liberaj samtage, pro tio ni estas partigitaj je ĉiuj tagoj de la semajno. Mi estas dimanĉe libera kaj komencas mian deĵoron ĉiulunde inter la 12-a kaj 16-a kaj finas ĝin post noktomezo. Somere antaŭtagmeze mi tramveturas al nia tramvojista banejo apud la malnova Danubo, kie mi naĝas, boatveturas eĉ ŝakludas kun miaj K-doj. Vintre mi ellitiĝas je la sepa, vizitas iun muzeon aŭ mi studadas ion (lasttempe esperanton) kaj antaŭe mi volonte studis la teorion de la belega kaj spiritfortiga ŝakludo. Marde mi komencas ofte je la naŭa sed ankaŭ je la 12-a. Dum la belega sezono mi promenas tra iu publika ĝardeno aŭ mi studas denove ion. Fininte mian deĵoron ordinare inter la 9-a kaj 11-a horo, mi ankoraŭ aŭskultas la diversajn prezentadojn de la en- kaj eksterlandaj Radio-sendiloj per mia kvarlampaparato. Merkrede mi dormas ĝis la sepa kaj poste mi preparas min je mia deĵoro, kiun mi finas je la sepa aŭ oka. Se la vetero estas bela mi promenas kun mia edzino aŭ ni denove aŭskultas la Radio-prezentaĵojn.

Ĵaŭde mi komencas je la 5-a kaj veturas ĝis la 8-a aŭ 9-a, iras poste hejmen kaj komencas ree je la 13-a aŭ 16-a; fininte ĝin je la sepa aŭ oka. Vendredo mi elveturas el la halo je la 6-a kaj devas veturi ĝis la 15-a posttagmeze, havante intertempe malgrandan tagmezan paŭzon. Post mia deĵoro mi vizitas iun banejon, lasttempe nian grandegan Amalienbanejon, kiu estas konstruita de nia socialista urbregistaro kaj estas nuntempe la plej granda en Eŭropo. Vespere mi ĉeestas iun klubvesperon de la laborista Esperanto-Ligo aŭ sekcion de la Aŭstria ŝakligo.

Je la 23-a mi revenas hejmen. Sabate je la 4-a kaj 45 minutoj mi ree komencas kaj veturas seninterrompe ĝis la 13-a posttagmeze. Somere mi tuj veturas al nia banejo apud la malnova Danubo aŭ mi migradas kun mia edzino en la belega ĉirkaŭaĵo de nia urbo.

Estante membro de la laborista asocio de Naturamikoj mi ofte ekveturas akompanata de amikoj ŝakaj aŭ esperantistaj en nian montaron, kie ni noktas en iu montdomo de la asocio. Dimanĉon vespere aŭ lunde frumatene mi revenas hejmen.



En vintraj monatoj mi dormetas iomete kaj vespere mi vizitas kun mia edzino teatron aŭ iu el niaj grandegaj popolaltlernejoj. Tie oni povas ĝui vespere diversajn prezentadojn por malmulte da mono. Dimanĉe, dum mia libertago, mi ekskursas aŭ dum la malvarma sezono mi vizitas antaŭtagmeze laboristan ŝakklubon kaj post la tagmanĝo ni vizitas parencojn aŭ mem estas vizitataj de ili.

Tiamaniere aŭ simile ĉiuj miaj tramvojistaj K-doj pasigas la semajnon, okupante sin dum ilia libertempo per diversspecaj sportoj. En la jaro ni havas laŭ la nombro de servjaroj 1 ĝis 4-semajnan forpermeson kiun multaj el ni pasigas en pli aŭ malpli proksimaj montoj por refreŝigi kaj refortigi sian sanon. Multaj ankaŭ prenas la libertempon parte kaj tramigradas nian belegan Wien'an arbaron. Rilate al nia salajro ni ne estas bonege sed ankaŭ ne malbone pagataj.

Saluton al ĉiŭj SAT-anoj kaj precipe la tramvojistaj de la tuta mondo.

Karlo Wiedermann (6723),
konduktoro de la Wien' a tramvojo.

LA RABISTOJ
Dramo en kvin aktoj de Schiller
Unu volumo in-8, 114-paĝa.
Prezo: 1.20 mk. g.

La Rabistoj estas la unua dramo publikigita de la fama germana verkisto Schiller. Ĝi aperis en la jaro 1781. Legante tiun tradukon "ni denove kaj profunde sentas, ke la lingvo de Zamenhof ne estas ia senviva ligita aŭtomato, kies ĉiuj movoj estas fikse antaŭregulitaj de ia logikema mekanikisto". (Carlo Bourlet.)

Havebla ĉe Administracio de SAT.

La mizero de la terkulturista Proletaro en Hungario

Eble neniu laboristo vivas en Hungario tiom mizere, kiom la terkulturistoj. Ili, kiuj rikoltas la grenojn por la pano kaj ĉiaspecajn nutraĵojn, ili malsatas pleje. Jen unue ni tradukas al vi leteron de unu terkulturisto:

"Laboristo mi estas ankaŭ, terlaboristo, mi volonte faras ĉiuspecajn laborojn, kiel: diglaboron, rikoltadon, draŝadon, pioĉadon, kotbrikfaron kaj putkonstruon. Mi tute ne malemas la laboron, ĉiam plej energie mi ĝin plenumas. La salajro?! Printempe ni ricevas proksimume 30—40 000 kronojn[1]) somere 40 ĝis 60 000 kronojn por unu tago. Ĝenerale mi gajnas, se estas laborokazo, semajne 300 000 kronojn. Mia familio konsistas el 5 membroj, sed kiel povas 5-membra familio vivi per tiu ĉi preskaŭ per sango akirita "almozmono". Jen estas la nutraĵoj, kiujn ni povas aĉeti per tiu ĉi sumeto semajne:

15 kgr.	da Faruno (por panon baki el ĝi) . . kostas	90 000 kr.
½ „	„ Graso (porka) „	17 000 „
1 „	„ Lardo . . . „	32 000 „
1 „	„ Fabo (seka) . „	6 000 „
6 „	„ Terpomoj . . „	15 000 „
2 „	„ Faruno (p. kuiri) „	14 000 „
½ „	„ Sukero . . . „	9 000 „
3½	litroj da lakto (por la 3 infanoj) . . „	17 000 „
1-monata luo por la loĝejo kostas 168 000 kr. sekve por unu semajno	„	42 000 „
Por ceteraj, kiel ½ litro da vinagro kaj petrolo	„	8 500 „
Por la tuta semajno ni devas elspezi nur por nutraĵoj		251 000 kr.

La restantaj 49 000 kr. estas por la vestaĵoj[2])."

Jen estas la buĝeto de nenion havanta terkulturisto en Hungario.

Sed en la sama situacio troviĝas la terkultura Proletaro en aliaj partoj de la lando ankaŭ. Ekz.: En la vilaĝo Beretyoufalu dum la pasinta jaro oni pagis al viroj por tago: 30—40 000 kr., al infanoj: 10—15 000 kr., al virinoj: 20—25 000 kr. La labortempo estas potage 10—12 horoj. En Debrecen: Potage viro povas gajni kun nutraĵoj: 35 000 kr. Sen nutraĵoj: 50 000 kr. Diglaboristo gajnas semajne: 300—450 000 kr. La senlaborecon montras la raporto el la vilaĝo Nagybajom; en ĉi vilaĝo loĝas proksimume 700 terkulturistoj, el inter ili printempe senlaboraj estas 500, somere 100, aŭtune 400, vintre 600 homoj. Sekve memkomprenebla estas ilia mizera vivo. Kaj ne estas mirinde se la salajroj tiom

---

[1]) 1 Dolaro = 71 000 kronoj hungaraj.

[2]) La letero estas tradukita el la gazeto "Voĉo de l' Popolo", 21. 1. 1927.

maltaltaj estas. Ja granda estas la konkurado por akiri laboron.

Sed ni rigardu la laboristojn, kiuj por jara laboro estas dungataj. Ĉi laboristoj kontraktojn faras kun la terbienistoj, por unu- aŭ kelkjara servado, tiaj estas: la veturigistoj, staloservistoj, ĝardenistoj, brutargardistoj kaj servistoj. Unu dungito el inter la supraj, en ŝtata terbieno gajnis dum la ekonomia jaro 1924—25 800 ĝis 1 500 kgr. da grenaĵoj, 300 kgr. da hordeo, 56 kgr. da porklardo. Potage 1 ltr. da bovinlakto, por unu porko paŝtejon, 300 kvadratmetrojn da tero por legomoj, 40 kgr. da salo. Por du semajnoj 15 garbojn da branĉaĵoj kaj por la tuta jaro 100 000 kr. Krom tio ili ricevas ankoraŭ malsanigan loĝejojn, kiuj konsistas plejparte el unu ĉambro kaj komuna kuirejo, kie sur la sama forno kuiras 2—4 servistedzinoj por 15—25 familianoj.

La saman sorton havas 1 100 000 terkulturistoj en la lando.

Kaj se iu havas la kuraĝon organiziĝi, aŭ diri la veron, tiam plej severe estas ili punataj. Ekz.: unu diglaboristo nomata Ŝtefano Hunya, kiu havis la kuraĝon disvastigi flugfoliojn, kiujn li mem redaktis kaj eldonis, inter la terkulturistaro, estas punita per 2-jara enkarcerigo pro tiu ĉi ago. En la flugfolio nur faktoj enestis, pri la mizerego de la terkulturistaro, kaj jen kiel severe juĝas la hungaria klasjuĝistaro pri tiuj, kiuj diras la veron. La K-do volis ĉion per faktoj pruvi, dum la proceso, sed la juĝistaro malpermesis tion.

Ĉi faktoj sufiĉe respegulas la mizeregon de la hungaria terkulturista Proletaro. Kaj bedaŭrinde preskaŭ nenia organizeco ekzistas inter ili, ĉar la registaro "Bethlen'a" per ĉiu maniero malpermesas tion.

Majo.

LA NOVA ĈINIO

Okazas en Ĉinio *socia* revolucio. Tio estas multe pli signifa ol politika ŝanĝiĝo. Ĝi koncernas la interrilatojn inter la dungintoj kaj dungitoj, kaj tio malrapide reordigadas la fundamentajn principojn de la ĉinia socio. La revolucion okazigis la okcidenteca instruado kaj la kontakto kun la fremdaj nacioj. La revoluciuloj estas homoj, kiuj malmulte respektas la antikvajn instituciojn. Ili penadas por akiri pli bonefikan vivon kaj pli da diversaj oportunaĵoj por la feliĉo.



Ĉefsidejo de Tutĉinia Laborista Federacio en Kantono

Iu ekzemplo pri ĉi tiu socia ribelo kuŝas en la postulo de la gejunularo por la libera edziĝo. Tio estas timiga novaĵo por la maljunuloj, kiuj antaŭe ĉiam pretendis havi la rajton decidi pri la geedzoj de siaj gefiloj. Tamen en Okcidento ni tre malŝatus, se la gejunuloj ne havus la rajton elekti mem sian kunul(in)on.

La gejunularo en Ĉinio komencas nun libere edziĝi. Nature, multo el la malnova kutimaro ankoraŭ ekzistas; la movado hodiaŭa estas kvazaŭ la eniro de kojnpinto en la disrompotaĵon.

La gejunularo volas rompi la katenojn, kiuj tenas ĝin en mensa kaj korpa servuteco.

La rolo de la virinoj

La virinoj, kiuj antaŭe havis malofte ian partoprenon en la familiaj aferoj — lasante flanke la demandojn, kiuj koncernas la sorton de ilia lando — nun eniras la politikon. Dum ili ludas pli kaj pli grandan rolon en la politikaj kaj ekonomiaj aferoj, ili fariĝas malpli dependaj de la malnova familia ideologio. Ili iĝas tute memstaraj en siaj opinioj. En la virinoj, eble, pli ol en ĉio, kuŝas la espero pri la estonta savo de Ĉinio.

Se la revolucia movado provizore malsukcesus en sia politika penado, aŭ estus venkita per pli potenca milita aparato, ne povas tamen esti dubo, ke la fortoj, kiujn ĝi liberigis, kreos pli malpli frue en Ĉinio novan soci-ordon — ordon, kiu aliigos la socion de la fundamento ĝis la supro.

Tiuj gestudentoj, tiuj metiuloj kaj kampuloj eltrovas en la revolucia movado intereson por sia vivo. Ili eltrovas la esprimilon por siaj individuaj gustoj. La revolucia movado kvazaŭ metas fortigilon en ilian sangon.

La gejunularo estas la suno, kiu lumigas la horizonton de la Ĉiela Imperio.

Norman Barrymaine.

Laŭ "*The Daily Herald*" (La Ĉiutaga Heroldo). London.

La vivo de hispanaj soldatoj en Maroko

(Letero de soldato)

Mi neniam estus kredinta la krimojn, kiujn tagojn post tago faras la burĝaro, nur ĉar la Proletaro ne estas unuiĝinta. Tial la burĝaro faras el ni tion, kion al ĝi plaĉas, sen memrespekto kaj sen konscienco. Sed tio daŭros nur ĝis la momento, kiam la mizerego malfermigos la okulojn kaj vidigos, ke oni havos rimedojn nur sekvante la leninajn teoriojn.

Jen mia vivo (se "vivo" ĝi estas nomebla). Dum la matenmanĝo oni manĝas nur iom da pano kun "kafo". La kafo estas muelita en iu sako kaj verŝita en kaldronegon kie estas akvo (por 160 soldatoj 1 kilogramo da sukero kaj 400 gramoj da kafo!) kaj, por ke la "kafo" havu iom da kafkoloro, oni verŝas en ĝin ... fulgon[1]). La matenmanĝo estas ĉiam la sama.

Post kaftrinkado, preskaŭ ĉiutage, oni ordonas al mi preni pioĉon kaj ŝovelilon por labori sur la ekzerckampo, kvankam ni ne ricevas por tio salajron. Ordonojn donas al ni serĝentaĉo, kiu, mi tion vidis, unufoje batis soldatojn, ĉar ili ne povis labori pro nesufiĉa nutrado.

Dum la tagmanĝo, preskaŭ ĉiam, oni manĝas teleron da riza supo (kiu nek rizon, nek grason enhavas ...), teleron da kikeroj (se ili estus bonaj, ne gravus ... sed ili enhavas *tro* multe da vermoj, ĉar dum tro longa tempo ili restis en la grenejoj de la burĝaro. Kiam oni ne plu povas ilin vendi, la registaro malkare aĉetas ilin por la soldataro). Oni manĝas nur malbonodoran porkaĵon.

Por la vespermanĝo ni havas la samon kiel por la tagmanĝo. La pano ofte ne estas manĝebla ...

Por dormi oni kuŝiĝas teren sub tendo, kaj kiam pluvas, ni malpuriĝas kvazaŭ nenia ŝirmilo estus. Ankaŭ niaj vestaĵoj estas tiom flikitaj, ke ne estas plu eble rekoni kia estis la ŝtofo nova. Ni havas nur unu veston: do neniam eblas ĝin ŝanĝi.

Ne unu mallonga letero, sed granda libro necesus, por priskribi la vivon, la mizeregon de hispania proleto. Finante mi petas helpon de tutmonda Proletaro por faligi la militregistaron de Prima de Rivera, por ĉesigi la senhontaĵojn.

Melilla, marto 1927.

[1]) Fulgo = surogato en soldata lingvo.

Proverbaro Esperanta

laŭ la verko "Frazeologio rusa-pola-franca-germana" de *M. F. Zamenhof,* aranĝis *L. L. Zamenhof.*

Unu volumo in-8, 82-paĝa

Prezo: 1,50 mk. g.

Adm. de SAT.

Sub jugo de orkolumaj sinjoroj

(Fino)

Kiu venĝos tion?

Legantoj de *Sennaciulo,* sendube, memoras, ke aŭtune en pasinta (1926) jaro en ĝi aperis noto pri ribelo en du regimentoj de holanda armeo. Turmentitaj per longa marŝado soldatoj-rezervistoj rifuzis iri pluen kaj komencis kanti "Internacion".

La kondiĉojn, kiujn trafis tiuj sentimaj bravuloj, sciigis al ni holanda SAT-ano R. D.:

"Plejmulto da ribelintoj estis arestitaj. Ankaŭ oni arestis kelkajn nekulpulojn, kiuj kelkajn tagojn pasigis en malliberejo, ne sciante, pro kio oni ilin arestis."

"Parencoj de arestitoj nenion sciis pri ilia sorto. Dum 30 tagoj armea estraro respondadis al la parencoj, ke ĝi "nenion scias pri tio."

"Situacio de arestitoj en malliberejo estas terura. Lumo mankas en ĉeloj kaj dum 14 horoj ĉiutagnokte la arestitoj troviĝas en mallumejo. Ĉelojn oni ne hejtas kaj la mallibereja estraro aroge "permesis" al arestitoj hejti fornojn, aĉetante lignon per sia propra mono. Sed la monon oni konfiskis."

"Ricevo de libroj aŭ ĵurnaloj estas malpermesita. La leteroj estas severe cenzurataj kaj plejofte perdiĝas".

"La arestitoj mem jam estas senigitaj de siaj nomoj kaj oni vokas ilin laŭ numeroj."



En "libera" lando

Eble la legantoj supozos, ke simila traktado al soldatoj okazas nur en armeoj, en kiuj oni servas devige. Tiuj K-doj eraras. Aŭstria SAT-ano sciigas al ni jenajn faktojn el vivo de aŭstria armeo, kiu konsistas nur el volontuloj:

"Dum militjuĝo kontraŭ laboristoj Fiala kaj Zamis, presintaj alvokon al soldatoj, la defendanto Steinhof rakontis:

En la 6-a regimento en Krems suboficiro Buhsbaŭm batis manon de soldato Vejtl per bajoneto kaj poste per piedoj premis piedfingrojn de malfeliĉulo."

"En 4-a dragona eskadrono kolonelo Caar tiom forte vipbatis manon de soldato Lejtner, ke rompiĝis lia mano. Plendo de l' batito ne estis akceptita kaj Caar estis deklarita senkulpa."

"Rezulte kreskas nombro de memmortigoj en la armeo: en 1922 jaro memmortigis sin 2 soldatoj, en 1923: 29, en 1924: 34, kaj en 1925: 50."

En letero, skribita antaŭ la memmortigo, soldato Lehner akuzis pri sia morto kapitanon Selner kaj skribis:

"Estu malbenitaj la oficiraj bandoj, havantaj nek koron, nek fajreron de homeco. Nur ili kulpas pri nia morto."

"Soldato Klaar memmortigis sin pro persekutado de majoro Hallinger, alia soldato — Domin mortigis sin ankaŭ pro persekutado de oficiroj."

Do, ni vidas, ke en volontulaj armeoj soldata vivo ankaŭ ne estas tro dolĉa. Konvinkinte junulojn servi en la armeo, la oficiraro turmentas ilin, ĉar pro subskribita kontrakto la malfeliĉuloj ne povas antaŭ signita templimo forĵeti uniformon. Pelate de senlaboreco aŭ aliaj similaj kaŭzoj, allogate de bona volontula salajro (treege granda kompare kun la aliaj armeoj), junularo flugas al kazernaj fajroj, kvazaŭ papilio al brulanta kandelo.

"Bolŝevika bataliono"

Alia ekzemplo — pri angla armeo. Buĉado, kiun nun aranĝas angla armeo kontraŭ liberiĝanta Ĉinio, indignigas multiujn. Ni ne volas pravigi tiujn angl-ajn soldatojn, kiuj ŝargas siajn kanonojn per kuglegoj kun surskribo "al Ĉinoj" (pri tiuj faktoj ĉiu povas multon legi en la ĵurnaloj), sed ni pensas: ĉu ili agas konscie? Ĉu ne junula braveco kaj samtempe veneniga ŝovinisma agitado de burĝaro regas ilin? Kaj ĉu ĉiuj agas same? Ne! Jen la ekzemplo, kiun priskribas angla K-do E. M.:

"Mi servis en angla regimento en Egipto en distrikto de la urbo Aleksandria. Nia tendaro troviĝis je 5 kilometroj de l' urbo. Fervojo estis malproksime, loĝlokoj malestis, ni vidis nur sablon kaj palmojn. La varmego estis netolerebla, nutraĵo taŭgis nur por porkoj.

Apud nia tendaro estis vojo, kiun ĉiutage superŝutis la sablo. Ĉiutage oni sendadis 20 soldatojn kun fosiloj, ordonante forĵeti la sablon. Sed kion ni povis fari per malbonaj instrumentoj? Laborante ĉe ega sunbrilo, ni ofte faladis pro la senfortiĝo.

Sed la estraro ne estis kontentigita. Ĝi ordonis elfosi novan vojon al tendaro de oficiraj familioj. La ordono indignigis soldatojn, 20 K-doj la saman nokton forkuris al Aleksandria, la aliaj rifuzis labori, suboficiroj forĵetis siajn galonojn. La timigitaj oficiroj sciigis al Aleksandria, ke "bolŝevikoj ribeligis la batalionon".

Taĉmentoj, venintaj el Aleksandria rapide «restarigis la ordon». La «bolŝevikoj» estis severe punitaj."

"Luksa" tagmanĝo

Por fini tiun ĉi liston de skizetoj el diverslanda soldata vivo, ni citas jenajn kelkajn linietojn el peresperanta letero de svediaj soldatoj, presita en rusa ruĝarmeana ĵurnalo "Ruĝa Militisto":

"Ofte, sed ne ĉiam ni ricevas sufiĉan kvanton da bona nutraĵo, sed oftete okazas, ke la nutraĵo estas pli malbona kaj iafoje eĉ tute ne manĝebla.

Ankaŭ ni rakontu pri la ordo de nia nutrado. Je la 7-a matene ni ricevas kafon, ĉiam maldensan kaj malbongustan, kun tritikbulko. Je la 11-a h. okazas matenmanĝo, konsistanta el terpomoj, haringo aŭ kolbaso kun saŭco kaj pano. Je la 6-a h. estas tagmanĝo el terpomoj, viando kun kreno, supo, karoto, legomoj. Ĉiuĵaŭde ni ricevas pizan supon kun kuirita sebo kaj mustardo. Iafoje la viando kaj sebo estas putrintaj, en pakaĵoj kun sekigitaj legomoj oni ofte povas trovi vermojn. Sed feliĉe tio ĉi ne tro ofte okazas. La menuo ĉiutage estas diversa."

Jen la faktoj, ciferoj, ĝemoj, kiuj montras vivon de "mortigistoj". Ĉu post ĉi ĉio oni povas ankoraŭ paroli pri abomeno kontraŭ ili? Ĉu iu ankoraŭ ne komprenas, ke soldatoj estas kontraŭvolaj mortigistoj (eĉ en volontulaj armeoj) kaj samaj viktimoj de kapitalista sociordo?

Komprenu, malkonsciuloj, ke la burĝaro per sia potenco premigas soldataron, uzante por tio ĉiujn rimedojn. Enkarcerigante sanajn junulojn en kazernojn, nutrigante ilin, kvazaŭ brutojn, per putranta viando kaj vermplenaj legomoj ("feliĉe, ne t r o ofte"!!), senigante ilin de civitanaj rajtoj, malpermesante ĉion, preskaŭ la spiradon mem, — la burĝaro faras el homoj maŝinojn, kiuj scias, ke "necesas kompreni, ke ne necesas kompreni". For komprenon, pensojn, homecon! Vivu bruteco, maŝineco! Jen estas la devizo de burĝaro, plenumata en vivo kaj kaŭzanta sennombrajn memmortigojn.

Rezulte senrajta, senigita de homeco, homo-bruto-maŝino pafas kontraŭ siajn fratojn, timante, ke pro malplenumo de l' ordono lian dorson trafos kuglo el revolvero de l' staranta malantaŭe oficiro.

Ne forpuŝu senkulpajn viktimojn de l' malbenita sociordo, komprenigu al viaj klasfratoj, vestitaj en soldatajn uniformojn, ke necesas kompreni, necesas batali, ĉiurimede altiru ilin al heroeca tutmonda proleta klaslukto! *Ro-No.*

Kok-bary

Kok-bary![1]) Ĉi-tio estas ĉevaloj, homoj, furioza kurego de centoj da bestiĝintaj ĝigit'oj[2]) — kurego, dum kiu oni forgesas ĉion — riskon, danĝeron, kie homa vivo kostas malpli ol kraĉaĵo de verda maĉtabako "nas".

Kiam sovaĝe krieganta amaso da rajdantoj persekutas feliĉulon, firme alpremintan al selo kapron, kaj penas dum furioza kurego forpreni ĝin, kiam en aero seninterrompe movbrilas skurĝoj, eniĝante ŝvitajn flankojn de ĉevaloj, kiam falintan ĉevalon kaj rajdanton piedpremas centoj da hufoj — tio estas kok-bary.

De kvar-kvinjara aĝo malgranda uzbeko, kirgizo, turkmeno, kiu apenaŭ povas sidi rajde per manetoj alkroĉiĝinte al kolhararo, revas pri tempo, kiam li partoprenos en kok-bary.

Al kok-bary kunveturas la plej bonaj rajdistoj el ĉiuj ĉirkaŭantaj vilaĝoj kaj kuniras miloj da homoj.

Ĉiuj revas pri ĉevalo, pri bona, pri la pli bona ol ĉe aliaj, pri ĉevalo, por kies akiro oni oferas lastan havaĵon.

Kok-bary estas ŝatata ĉie. En varmegaj stepoj de Bukario, en ardiĝantaj sablaroj de Turkmenio, sur neĝaj supraĵoj de Gamiro kaj en montoplena Taĝikio.

Dum alfluginta ventego de la revolucio, kiu konsternis kaj ekskuis Mez-Azion, oni forgesis kok-bary.

Sed pasis tempo kaj reviviĝis kok-bary. Denove kuregas ĉevaloj, kantas kaj fajfas en aero skurĝoj, kaj denove senpieda kapra korpo regas la cerbojn. Tion lerte eluzis naskiĝinta dum revolucio basmaĉismo[3]).

Vastaj estas stepoj de Mez-Azio, multaj bonaj ĉevaloj kuregas sur ili en haladzo de kok-bary ...

... Sed jen subite ĉe plimulto da rajdistoj aperis en manoj pafiloj, revolveroj, sabroj, kaj kun sovaĝa kriego ventosimile entranĉiĝas vilaĝon basmaĉa bando. Mortiginte membrojn de vilaĝ-soveto kaj aliajn multajn kamparanojn, prirabinte la vilaĝon basmaĉoj rapidege rifuĝas proksimajn montojn.

Per kok-bary ili forprenis ĉe kamparanoj la plej bonajn ĉevalojn. Sub ŝajno de kok-bary ili atakis garnizonojn, maskis ŝanĝojn de siaj pozicioj, rifuĝis de persekutado. Tial lastajn jarojn kok-bary estis malpermesita kaj oni ĝin aranĝis nur en distriktoj, kie basmaĉismo forestis.

Dum 1926 kok-bary ree reviviĝis. Loĝantaro revenis al sia plej ŝatata nacia ludo.

Denove kuregas ĉevaloj, denove famo dependas de sukceso en kok-bary, denove la kapojn regas senpieda kapra korpo.

Reviviĝo de kok-bary elokvente parolas pri forigo de basmaĉismo. Mortis iam minaca basmaĉismo, forkuris kontraŭrevoluciuloj Afganion aŭ kapitulaciis antaŭ la registaro.

Kaj trankvile estas en stepoj, sablaroj kaj montoj de vasta Mez-Azio.

Kok-bary reviviĝis.

Laŭ *"Vero de Oriento"* trad. *S. Bojev*, Aŝĥabad.

[1])Per litero *y la* aŭtoro verŝajne volis esprimi la sonon iom similan al la germana *ü* aŭ franca *u*, sed pli malmolan. Ĝi ekzistas en preskaŭ ĉiuj slavaj lingvoj kaj estas ruse nomata "ery". — *Noto de la Redakcio.*

[2]) "Ĝigit" signifas kuraĝulo, ankaŭ lerta ĉevalrajdanto.

[3]) "Basmaĉ", loka nomo donita al banditoj, surĉevale atakantaj vilaĝojn.



Kiom oni perlaboras en Usono dum unu minuto?

La sekretario de la unuiĝo de la horloĝistoj en Filadelfio Hais elkalkulis, ke la meza rekompenco de usona laboristo estas 1,5 cendoj por minuto (90 cendoj pohore).

Kaj kiaj estas la perlaboroj de intelektaj laboristoj aŭ de tiuj, kiuj okupas gravajn sociajn oficojn? Laŭ la elkalkuloj de la menciita sekretario, prezidanto Coolidge ricevadas 50 cendojn por minuto, sed la "filmostelo" Gloria Svanson perlaboradas ne malpli ol 7 dolarojn kaj 40 cendojn ĉiuminute ĉe okhora labortago.

La direktoroj de fervojentreprenoj, bankoj, asekurkompanioj k. a. havas 50 ĝis 60 cendojn por unu minuto, kio estas nulaĵo kompare al la enspezoj de la filmartistoj kiel, ekzemple, Fairbanks kaj Chaplin, kiuj ricevadas 11 cendojn por ĉiu sekundo aŭ 6,60 dolarojn minute!

Sed malgraŭ la altaj laborsalajroj tamen en Usono ankaŭ ekzistas senlaboruloj kaj malriĉuloj, ne havantaj sufiĉan panpecon por satiĝo ...

El *"Lodzer Togblat"* eljudigis Iuelmultiuj.

☆ DISKUTEJO ☆

Ne vere sed ne malvere
aŭ
pri antaŭjuĝoj

Laŭ la respondo de nia ruĝarmeana K-do 9741, en Sovetio ne ekzistas leĝo deviganta la civitanojn demeti la ĉapelon, kiam estas muzike ludata la Internacio. Bone! Jen fakto vere ĝojiga. Tamen informante nin pri tiu demando, nia sovetia K-do uzis esprimojn montrantajn al ni, ke la sovetia popolo "respektas" la antaŭjuĝojn tutsame kiel la popoloj de la kapitalistaj landoj.

Antaŭ ĉio mi atentigas pri tio, ke mi tute ne intencas ĉikani nek polemiki: la temo ŝajnas al ni grava kaj inda je iom "profunda" sed tamen kamaradece ĝentila diskutado.

Ni unue konsideru, ke ekzisto aŭ neekzisto de leĝo rilate salutdevigon kiam sonas iu nacia himno aŭ pasas iu nacia flago signifas absolute nenion.

Efektive, en kapitalista Francio — same kiel en "malkapitalista" Sovetio — estas nenia leĝo deviganta la ŝtatanojn demeti la ĉapelon je la ĉi supre aluditaj cirkonstancoj. Tamen multfoje okazis, ke iuj civitanoj ne demetis la ĉapelon ... sed ili pro tio estis de la ilin ĉirkaŭanta amaso devigitaj fari tiun geston kaj eĉ estis pli malpli dolorige batitaj!

En Sovetio ĉiuj civitanoj senĉapeliĝas *pro rememoro pri la grandaj, gloraj tempoj de klasbatalo.*

Ĉiuj religiuloj same senĉapeliĝas *pro rememoro pri la grandaj, gloraj tempoj de porreligia batalo.*

Same la patriotuloj senĉapeliĝas antaŭ la *nacia flago por rememoro al la grandaj, gloraj tempoj de pornacia batalo.*

Kiam unuanime kaj propravole niaj rusiaj K-doj senĉapeliĝas pro tio, ke al iliaj oreloj sonas la Internacio, ili nur imitas geston oficiale instruitan de ĉiunaciaj kapitalistaj-regantoj — sed tiel agante ili "honoras" nenion.

Cetere ne nur en Sovetio tiu burĝeca kutimo estas konstatebla. En Paris — kredeble ankaŭ aliloke — la komunistoj (mi mem estas komunisto) tre zorgas pri ĝia plenumo. Mi memoras, ke lastan jaron, dum la ĉiujara manifestacio memore je "komunumo", kelkaj K-doj ne senĉapeliĝis pasante antaŭ la "Muro". Ho, ve! El la ĉirkaŭanta amaso eliĝis kelkaj furiozigitaj "estontaj ruĝarmeanoj" kiuj perforte senĉapeligis tiujn K-dojn. Tamen en Francio ne estas leĝo deviganta fari tiun geston! ... Oni do povas sin demandi kiel kondutus la franciaj komunistoj, se ili regus la landon.

Dirante, ke ĉiuj sovetianoj unuanime demetas la ĉapelon, kiam eksonas la "Internacio", K-do 9741 diris nur duonveraĵon, ĉar la sovetianoj kredeble ne senĉapeliĝas! ...

Pli kaj pli la viroj kutimas ne uzi kapveston, t. e. ke pli kaj pli ili promenadas nudkape. Sekve kiam tiu modo estos ĝeneraliĝinta, ĉu *pro memoro al la gloraj tempoj ktp.* oni devos demeti la pantalonon? ... Kial ne!

Estas strange — sed ege bedaŭrinde — ke la proletoj ne estas kapablaj pensi kaj agi aliel ol al ili instruis la burĝoj.

Gloro! ... Sed kio do estas *gloro?*

Gloro estas sensignifa vorto uzita de ĉiunaciaj regantoj por blindigi la popolojn, sed *gloro* ne ekzistas.

Por revoluciuloj ekzistas nur *devo,* nepra *devo* ĉiel agi por forigi la maljustecon kaj starigi socion en kiu la homoj estos vere liberaj ... eĉ promenadi kapvestite se tio plaĉos al ili.

Estas memkompreneble, ke mi ne riproĉas niajn sovetiajn K-dojn, ke ili ankoraŭ ne sukcesis malaperigi ĉiajn stultaĵojn de ili hereditajn el la carismo. Mi kontraŭe admiras ilian persisteman fervoron nuligi ĉion malbonan kaj starigi bonaĵojn: mi nur atentigas ilin pri tio, ke antaŭjuĝo estas antaŭjuĝo ... eĉ en Sovetio.

SAT-ano 55.

TRA ESPERANTIO

VII-a Kongreso de SAT
Lyon (Francio)
12.—16. aŭgusto 1927

5-a Komuniko

Kongresejo. — La kongreso okazos en la salonego "Emile-Zola" de kooperativo "L' Unitaire", 127, rue Boileau, Lyon-VI.

Kongreskomitato. — Prezidanto: K-do Marcel Roux, 90, rue Boileau, Lyon-VI (Francio), al kiu oni sendu aliĝilojn, leterojn, monon, ktp.

Kotizo. — Egala je SAT-kotizo, sed ni dankeme akceptos plian monon, kiun bonvolos donaci aliĝintoj por helpi la komitaton plej bone aranĝi la kongreson.

Pago. — Per naciaj monbiletoj aŭ ĉeko en registrita letero. Francianoj prefere pagu al K-do Léon Chaussade, 64, rue des Macchabées, Lyon-V (Chèque postal: Lyon 7521).

Perantoj kaj agentoj kiuj kolektis la kotizojn, bonvolu tuj pagi al la komitato; nur estas valoraj la aliĝiloj akompanataj de mono.

4-a Listo de aliĝintoj

87.	K-do	Vinogradov, Nijni-Novgorod	5545
88.	„	H. Konovalov „	641
89.	„	V. Kalaŝnikov, „	1125
90.	„	V. Strijak, Ĥarkov	5634
91.	„	Max Häckel, Leipzig	1162
92.	„	Lidin, Moskvo	41
93.	„	Naville, Tiflis	2042
94.	„	R. Schneider, Leipzig	3162
95.	„	Goldfeder, Kremenĉug	5448
96.	„	E. Izgur, Kremenĉug	2332
97.	„	Otto Bässler, Leipzig	715
98.	„	Groĥotov, Ĥerson	7348
99.	„	René Delalande, Bourges	5820
100.	K-dino	M. R. Mollet, Lyon	6963
101.	„	Louzon, Alger	5064
102.	K-do	Pinty, Alger	8554
103.	„	Bureau, Alger	8555
104.	„	P. Proĥorĉik, Minsk	4430
105.	„	Otto Bruder, Halle	6150
106.	„	Nikolao Graĉev, Ivanovo-Voznesensk	6319
107.	„	Mailand, Kassel	265
108.	„	Walter Vogel, Leipzig	174
109.	K-dino	Olga Alaŭdina, Ivanovo-Voznesensk	6162
110.	„	Anna Medvedeva, Ivanovo-Voznesensk	6321
111.	K-do	J. Vahlin, Moskvo	4831
112.	„	A. Wieditz, Elberfeld	821
113.	K-dino	Marg. Jäkel, Bad Schlag	4666
114.	K-do	E. Robert, Le Raincy	741
115.	K-dino	A. Favreau, Bonneval	5885
116.	K-do	E. Ĉiĉaĥov, Kamenskoje	6353
117.	K-dino	F. Ĥrapovickaja „	9990
118.	K-do	Natan Braginskij „	8784
119.	„	Alfred Franz, Düsseldorf	1563
120.	„	X, X	4899
121.	„	G. Salan, Montpellier	3905
122.	„	E. Endler, Selb	6523
123.	K-dino	G. Bechert, Selb	6524
124.	K-do	A. Capoulade, Cette	6659
125.	„	J. Panuŝka, Troyes	7394
126.	„	Masetti, Torino	1530
127.	„	Champion, Buenos-Aires	7545
128.	„	Willy Weisbach, Kändler bei Limbach	5836

Pervagonara veturado de limstacioj ĝis Lyon. — La prezoj publikigitaj en la 4-a komuniko koncernas nur koston de ira bileto.

En 6-a informilo, ni sciigos pri hortabelo de vagonaroj el limstacioj.

Eldonaĵoj. — La komitato eldonis serion da 20 belegaj poŝtkartoj kun esperanta teksto kaj reklamo pri la VII-a Kongreso. Prezo afranke: 4 fr. fr. (por francianoj: 3,25 fr.).

Al ĉiuj K-doj pagintaj 2,50 fr. fr. (francianoj: 2,25 fr.) estos sendita urboplano kun lukse presita 120-paĝa gvidlibro pri Lyon. Ĝia teksto estas franclingva, sed la urbokarto ebligos al ĉiu alveninto facile trafi la kongresejon.

Kosto[1]) de manĝoj kaj de hotelĉambroj. — Matenmanĝo: 2 fr.; tagmanĝo 10 fr.; vespermanĝo: 10 fr.

Hotelĉambro, ponokte: 18 fr.

Tiuj prezoj estas maksimumaj, sed ni certigas sufiĉe gravan rabaton konsentitan de hotel- kaj restoraciestroj, al K-doj kiuj antaŭpagos luon de ĉambro kaj koston de manĝoj dum la kongresdaŭro. Pri tiu grava punkto rilatu kun la komitato.

Salutvespero. — Ĝi okazos vendredon 12-an de aŭgusto, je 20 h. Alvenontoj lertaj pri kantado de esperantaj kantoj estas varme petataj informi nin, kiel ili povos helpi la komitaton prezenti belan koncertan parton de la solena vespero.

Fakokunvenoj. — Ni alvokas fakestrojn rilatiĝi kun la komitato por prizorgi specialajn kunsidojn (ekz.: liberpensuloj, kooperativanoj, radiistoj, sportuloj, poŝtistoj, fervojistoj, edukistoj, ktp.).

Jam ni plezure notas, ke:

1., K-do Charles Despeyroux, Faculté des Lettres, Lyon-VII (Francio) respondos petojn de *Studentoj* pri ilia faka kunsido.

2., K-do Oscar Brebant, 3-g, rue Paul-Bert, Lyon III (Francio) prenis sur sin la taskon organizi la kunvenon de *ruĝfrontbatalantoj kaj de komunistoj.*

Komitatdeĵorado. — La 10-an, 11-an kaj 12-an de aŭg., de 9-a ĝis 11-a, kaj de 14-a ĝis 17-a, la komitato deĵoros en la kongresejo kaj en la sidejo de Esp. Lab. Grupo (adreson vidu sur jarlibro). Ankaŭ notu, ke la adreso de la Prezidanto estas nur poŝta, sed ne loĝeja.

Propagandaj kunvenoj. — Mardon 16-an de aŭg., vespere, estos organizita internacia kunvenego. Alparolos la publikon franciaj kaj alilandaj SAT-anoj. Oratoroj pretaj eventuale helpi nin, bonvolu tuj skribi al la komitato.

La grupo de Saint-Etienne organizos, merkrede 17-an de aŭg., vespere, kunvenegon. Sin turni al K-do J. Rival, 38, rue de la Paix, St. Etienne (Francio).

Same agos la grupo de Grenoble, kiu plie preparas postkongresan ekskurson en sian urbon kaj en Alpan montaron. Informojn petu de K-do P. Ragault, 86, cours Berriat, Grenoble (Francio).

Ankoraŭfoja atentigo. — Estus bone, se en ĉiu loko kie troviĝas almenaŭ unu SAT-ano, laboristoj kaj ties organizoj, gazetoj, ktp. scius pri nia VII-a SAT-kongreso. Kompreneble, ni ne reklamu pri la kongreso sola, sed pri grava utileco kaj neceseco de nia movado, pri la servoj, kiujn SAT jam plenumas por bono de Laboristaro, por ĝia klerigo kaj mensliberiĝo. Tia tasko estas plenumebla; sufiĉas, ke K-doj konsciu pri seriozeco de nia afero kaj pri sia devo.

[1]) — Usona dolaro valoras 25,50 fr. fr.

Post malpli ol 2 monatoj malfermiĝos la VII-a kongreso! Kiuj ankoraŭ ne aliĝis tiuj faru tuj! La salonego estu plena je diverslandaj SAT-anoj!

Ĉiu ĉeestonto efektivigu nian deziron klarigitan en 3-a komuniko; tiel vaste profitos nia afero kaj disvolviĝos nia Sennaciismo, kun nova forto, por nova socio.

Komisiite de l' Kongreskomitato:
La prezidanto: *M. Roux.*

*

PROVIZORA TAGORDO
de la oficialaj kunsidoj ĉe la VII-a Kongreso
Lyon — aŭgusto 1927

a) Raporto de la Ekzekutiva Komitato;
b) Raporto de la Administracio;
c) Raporto de la Redakcio de "*Sennaciulo*";
ĉ) Raporto de la Redakcio de "*Sennacieca Revuo*";
d) Raporto pri "*La Lernanto*";
e) Raporto pri SAT-presservo;
f) Raporto pri fondo de SAT-presejo;
g) Raporto de la komisiono elektita en Leningrad pri rilatoj inter SAT kaj la landaj asocioj;
ĝ) Debato pri oficiala fondo de SAT-grupoj daŭrigo de la debato okazinta ĉe la Leningrada kongreso, — pri tio vidu la kongresprotokolon kaj n-on 123/4 de "*Sennaciulo*";
h) Debato pri la projekto de SAT-programo;
ĥ) Diversaj temoj kaj demandoj.

*

LA PROJEKTO DE NIA PROGRAMO
Esperanto kaj Proletaro

Kiel estas jam dirite, la unua parto de la programprojekto (publikigita en "*S-ulo*" n-o 26 (78), de la 25-a de marto 1926 kaj ĵus represita) montras, kiel la historia neceseco de lingvo universala elkreskas el la kapitalista produktad- kaj sociordo.

La dua parto de la projekto klarigas la rolon, kiun la Proletaro devas ludi en la esperantista movado.

Post konstato, ke esperanto estas ne lingvista spekulaciobjekto, sed vivanta lingvo jam enirinta en la socian vivon, la projekto analizas la kapitalistajn kontraŭdirojn, por konkludi, ke la burĝaro ne povas triumfigi la mondlingvan movadon, kvankam tiu movado estas produktaĵo de l' kapitalismo, ĉar la pligraviĝo de la kapitalistaj konfliktoj, militoj kaj akriĝantaj sociaj kontraŭpuŝoj, minacas detrui la tutan nuntempan civilizacion. Katastrofoj ĉiuspecaj nin atendas je ĉiuj direktoj de la horizonto.

Ni ĉiuj konas la dolorigajn sekvojn de la lasta mondmilito. La nova milito, kiu minacas — kaj kiu certe eksplodos, se la Laboristaro ne haltigos ĝustatempe la teruran danĝeron, — etendiĝos sur pli vastan teritorion ol la antaŭa, ĝi estos pli detruiga, ĝiaj sekvoj por la tutmonda ekonomio estos multege pli pereigaj. Detruante la internaciajn rilatojn ekonomiajn kaj kulturajn, kiuj estas la bazo de lingvo universala, kaj frakasante la civilizacion nuntempan (de kiu esperanto estas ero), la kapitalistaj katastrofoj estas teruraj malamikoj de nia movado. Sekve esperanto ne povas venki en la manoj de la burĝa klaso, reprezentanto de tiu pereiga kaj minacanta sistemo.

La sociklaso, kies historia tasko estas la savo de la valoraj konkeraĵoj de la nuna civilizacio, estas la laborista klaso. Nur la laborista klaso kapablas konstrui mondon

sen militoj kaj sen sociaj interbataladoj. Pro tio esperanto povas venki nur kiel instrumento de la Proletaro en la klasbatalo kontraŭ la burĝa klaso, kies reĝimo estas nuntempe minaco por ekzisto kaj kulturo de la homaro.

Tiu ĉapitro de la programo difinas la diferencon inter la proleta kaj la burĝa movadoj esperantistaj. En ĝi estas esprimite, ke la historio mem, — kies leĝojn la programo analizis, — kaj ne iluzioj aŭ senbazaj pretendoj niaflankaj, metas en la manojn de la Proletaro la zorgon pri la venko de esperanto, ke la esperanto-movado triumfos kiel proleta batalilo, aŭ ke ĝi tute ne triumfos.

El tiuj konsideroj rezultas, ke la burĝa movado esperantista portas mortoĝermon en sia brusto, same kiel ĉiuj kulturklopodoj de la burĝaro en nia epoko de imperialista kapitalismo. Tial la burĝaro ne povas uzi esperanton por la bono de l' homaro, sed nur por limigitaj celeroj, je sia klasa intereso. La evolucio de la "neŭtrala" esperanto-movado dum la lastaj jaroj liveras kvantegon da pruvoj por tiu aserto. Sufiĉas rememori pri la reakciiĝo de tiu movado, pri la kreskanta influo de klerikalismo, monarĥismo, policaj interesoj, ktp., pri la senspiritiĝo de tiu movado, en kiu eĉ la "interna ideo", iam tiel glorigita, fariĝis kompromitiga ideo, pri kiu la neŭtraluloj nun preferas silenti. Vantaj plezuroj, senenhavaj paroladoj, senspiritaj deklamoj karakterizas la burĝan esperanto-movadon. La spirito kaj la animo translokiĝis en nian kampon, ne spirito de la "interna ideo" kaj kulto de "esperantismo", sed la animo de proleta klasbatalo, la entuziasmo de klaso, kiu luktadas por konkeri la mondon.

La tria parto de la programprojekto, temante detale pri la celoj de SAT, certe bezonas la plej grandajn korektojn kaj la plej profundan diskuton. La projekto estis ellaborita antaŭ du jaroj. Depost tiu tempo, multo okazis, grandaj progresoj estis realigitaj, novaj vojoj al sukceso malfermiĝis antaŭ ni. Jen pro kio necesas ĝin kompletigi kaj ĝin adapti al la bezonoj de nia kreskinta movado.

Espereble la diskuto en nia gazeto estos sufiĉe vigla por liveri valorajn materialojn kiel bazon por la laboroj de nia VII-a Kongreso. *Lucien Révo.*

*

LA PROPAGANDMETODOJ

Ni volonte enpresas la ĉi suban artikolon kaj la poste sekvantan leteron de Wien'aj SAT-anoj, ĉar ili ambaŭ temas malsame pri la sama problemo.

La malproporcio inter la sovetia kaj ekstersovetia esperanta movado certe ekzistas. K-do Weber tute logike montras, ke la plej bona rimedo, por ĝin eviti, estas pliintensigo de ekstersovetia esperanto-propagando. La propagandmetodo, proponata en ĉi artikolo, estas bazita sur la proverbo "neniu estas profeto en sia lando" (...des pli se li estas sennaciulo kaj ne havas **sian** *landon...).*

La Wien'aj SAT-anoj aliel pritraktas la demandon. La malproporcio ne timigas ilin. Sovetio ja estas la lando instruonta aliajn landojn, — ili diras. Do ju pli ĝi estos esperantigita, des pli multe esperantiĝos alilandaj laboristoj, sekvante la bonan ekzemplon. Do ni ĉiel helpu la sovetian esperanto-movadon...

La "Sovetia Demando" en Esperantio!

Oni jam kelkfoje povis legi en "*S-ulo*", ke la esperanto-movado en la ekstersovetiaj landoj antaŭeniĝis ne sampaŝe kun ĝia prospero en Sovetio. Minacas iom-post-ioma seniluziiĝo de niaj sovetaj Gek-doj pro nesufiĉa kontentigo de ilia korespondemo, el kiu facile povus estiĝi haltigo de la tuta movado. Kiel aliigi la aferon? Temas ja eltrovi novajn aplikeblajn metodojn de propagando. Mi opinias ke, se ni ne sukcesis plenefike propagandi interne de niaj regionoj kaj medioj, ni provu fari tion ekster ili, t. e. ni ŝanĝu nian laborkampon reciproke kun la Gek-doj el aliaj landoj. Mia propono ĉi-cele estus jena: Ĉiu korespondant(in)o sciigu al siaj gekorespondantoj tiujn organizojn (politikaj, sindikataj, ateistaj, sportaj ktp.), kiujn li intencas esperantigi. Poste la tiel informitaj eksterlandaj gekorespondantoj skribu leterojn *por*esperantajn al tiuj organizoj, kun kiuj ili persone rilatas laŭ la tendencoj politikaj, sindikataj, profesiaj ktp. atentigante la ricevontojn neesperantistajn pri la graveco kaj neceseco de esperanto en la liberiga batalado de la Proletaro tutmonda. La skribantoj precipe akcentu sian deziregon, kiel eble plej baldaŭ povi interrilatiĝi rekte al la samklasuloj per esperanto, ĉar nur tiel povos esti garantiata firma unuiĝo inter la Proletaro el diversaj landoj. Neniel malutilos atentigi la ricevontojn pri tio, ke estas malinde veran klasbatalanton ne ekposedi tian armilon, kia estas la lingvo internacia. Por efikigi la aferon, estas rekomendinde, sendi amase la leterojn, se la cirkonstancoj permesas tion. Kie ekzistas grupoj, tie oni igu ĉiujn samtendencajn K-dojn sendi propagandajn leterojn al la sama adreso. Estus dezirinde, ke ankaŭ estu interŝanĝe sendataj propagandaj leteroj de eŭropaj korespondantoj kun ekstereŭropaj, por montri la disvastiĝon de esperanto. La ricevitajn leterojn oni post traduko aŭ transdonu al la estro de la koncerna organizo aŭ, se tio estas ebla, laŭtlegu ilin dum la kunvenoj. Tute ne pretendante, ke mia propono estu rigardata kiel sola solvo de la problemo, mi petas la Gek-dojn aŭdigi siajn opiniojn, konsiderante la seriozecon de la demando. Ĉiuokaze kvazaŭa superŝutado al la skeptikemuloj dormemuloj kaj diversaj aliaj "neemuloj" per admonleteroj el eksterlando faciligos nian laboron poresperantan. Do ni agu laŭbezone!

Karl Weber, Untermenzing ap. München.

* * *

Letero de Wien'aj SAT-anoj

Wien, majo 1927.

Karaj Gek-doj ĉiulandaj!

Ni subskribintoj, socialdemokrataj SAT-anoj de Wien legis kun granda atento jenan rimarkon en "S-ulo" n-o 137 de 14. 5. 1927: "Se ĉiu ekstersovetia SAT-ano sendos semajne unu interesan leteron en Sovetion, la nombro de sovetiaj esperantistoj baldaŭ dekobliĝos."

Vi ĉiuj, Gek-doj en la tuta mondo, kiuj staras sur la bazo de klasbatalo, tute egale ĉu vi estas socialdemokratoj, komunistoj, anarkistoj aŭ aliaj socialismaj klasbatalantoj, vi certe ĉiuj senescepte komprenas la neeldireble grandan signifon, kiun havas la disvastiĝo de esperanto ĝuste en Sovetio, en la sola ŝtato kun laborista registaro. Ĉu vi povas mense taksi kio okazos, kiam ekzistos milionoj da esperanton parolantoj en Sovetio, kiam tiuj milionoj multope esperantigos hindojn kaj ĉinojn? Ĉu vi kapablas nur iome, skemece ekpensi, kia giganta, nerezistebla lavango de interkompreniĝo ruliĝos tiam de oriento al okcidento unuigante la ekspluatatojn en batalpretan, nevenkeblan amason, frakase dispremantan la kapitalismon?

Jes, ni subskribitaj SAT-anoj volonte plenumos la deziron esprimitan en la supre citita rimarko. Kun granda plezuro ni sendos almenaŭ unu interesan leteron ĉiusemajne en Sovetion kaj petas ankaŭ vin ceterajn ekstersovetiajn ge-SAT-anojn fari la samon.

Hermann Bauer (7026), Johann Winkler (4369), Hohenecker (5190), Anton Carb (6411), Jilka Leopold (4682), Bergmeier Paul (4098), Georg Parnes (9258), Jeannette Parnes (7022), Kacimbersky Johann (4683), Ludwig Kunat (8467), Poppe (7031), Käthe Knöpfelmacher (9259), Slezak Josef (1112), Franz Hintenberger (5757).

Ĉu oni povas per helpo de esperanto travojaĝi la mondon?

Kiel favora migradbirdo mi povas konstati, ke estas eble per helpo de nia lingvo travojaĝi la mondon, nesciante la naciajn lingvojn de la trairataj landoj. Tre multaj K-doj ankoraŭ dubas pri tiu ebleco. Mallonge mi volas raporti kelkaĵon pri mia lasta duonjara migrado (Vieno, Aŭstrio, ĝis Marseille, Francio).

La 21. 4. 26 mi komencis mian migradon de Vieno. Inter la urboj Vieno kaj Salzburg, mi preskaŭ en ĉiu urbeto kaj eĉ vilaĝo trovis esperantistojn. Ja mi rimarkis, ke kelkaj vilaĝinstruistoj instruas nedevige nian lingvon al siaj gelernantoj. SAT-anojn mi renkontis en Linz kaj Salzburg. En Aŭstrio oni sin povas interkomprenigi tre facile per esperanto.



K-do Erwin Dann.
Senripoza vagulo, studanta geografion ne nur per mapo . . .

Poste migradinte Germanion, tra la urboj: Rosenheim, München, Dachau, Ingolstadt, Nürnberg, Ansbach (Bavario), Heidelberg, Mannheim, Worms, Mainz, Frankfurt a. M., Giessen, Kassel, Dortmund, Düsseldorf, Köln a. Rh., Koblenz. En ĉi citataj urboj mi ĉiam renkontis SAT-anojn, kiuj ĉiuflanke helpis al mi. En Kreuznach kaj Trier mi trovis samideanojn, al kiuj mi ankaŭ ŝuldas tre multe da danko.

En banloko Mondorf (Luxemburg) proksime de Thionville mi preterpasis la francan limon. Komence mi ankoraŭ povis uzi la germanan lingvon; sed iom post iom foriĝis tiu ebleco kaj mi komprenis la turmenton de homo pro nescio de lingvo en kies lando li vojaĝas. Nur koncize mi povis parolaĉi la plejan necesaĵon, kion oni nepre bezonas, — ofte vane. En Nancy mi renkontis kun granda ĝojo la unuajn franciajn esperantistojn. De nun mi sentis min kvazaŭ hejme: Dum aliaj fremduloj nesciante la francan lingvon penas tiom por povi parolaĉi, — parolas mi nian facilan ĉarman Zamenhof'an lingvon. Belajn, belegajn horojn mi travivis en Nancy kun la K-doj. Plue oni lernigis al mi ankoraŭ kelkajn frazetojn plej necesajn franclingve. De Nancy mi daŭrigis la migradon tra: Vitry, Chalons sur Marne, Paris. Pere de la SAT-libro tuj mi trovis en Paris noktejon en malmultekostan: ("Trait d' Union", 180 bis rue Tolbiac). Tie mi ankaŭ trovis esperantistojn. En Paris volonte mi estus restinta; kaj laboron mi ankaŭ trovis; sed ne ricevinte de la polico la impostkarton por eksterlandanoj, mi ne rajtis akcepti la proponitan laboron.

Poste mi daŭrigis la migradon tra la urboj: Chateaudun, Vendôme, Angers, Nantes,

St. Nazaire. Ĉi tie mi pensis trovi ŝipon, kiu senpage min veturigus al Bordeaux; sed ne havinte feliĉon, mi daŭrigis mian migradon, tra: Roche s. Jou, La Rochelle, Rochefort, Bordeaux. En Bordeaux mi renkontis samideanon, kiu proponas al mi sian biciklon por mia plua vojaĝo.

Tuj mi ĝin aĉetas kaj post kelkaj tagoj forrajdis sur la ŝtalĉevalo tra la urboj: Agen, Toulouse, Carcassonne, Béziers, Montpellier, Cette, Nimes, Marseille. Ĉi tien mi alvenis la 20. 11. 26. SAT-anojn, kies adresojn en la jarlibro mi trovis, mi vizitis kaj ili akceptis mian viziton kun granda ĝojo, ĉiuflanke helpante al mi.

Miajn vojaĝelspezojn mi gajnis per vendado de poŝtkartoj fotografado de grupoj ktp.

Al tiuj multaj K-doj, kiuj tre afable helpis al mi dum mia longdaŭra vojaĝo, mi hodiaŭ ankoraŭ unu fojon diras mian tre sinceran dankon.

Antaŭ ol komenci mian pluan vojaĝon, mi intencas partopreni la VII-an kongreson kaj tiamaniere ĝui kun la SAT-K-doj tiun karan ligilon kiu estas esperanto. Jen la solvo de la taŭgeco de nia interkomprenilo.

Multaj ne SAT-anoj promesis al mi SAT-aniĝi; se kelkaj K-doj tion forgesis, mi hodiaŭ ilin rememorigas, por plenumi siajn promesojn.

Erwin Dann, vagulo *(5386)*,
nuntempe en Marseille.

Jubileo-Ĉeno[1])

Tadeosjanc (Krivoe-Ozero) 1 rubl.; K-dino **Harries** (Leicester) 10/- ŝil.; **Andersson** (Göteborg) 1,25 mk. g. laŭ alvoko de Tondok (Weissenfels) kaj invitas Karlsson (Göteborg). **Holmgren** (Göteborg) 1,25 mk. g.; **Coll** (Grenoble) 5 fr. fr.; **Panuŝka** (Troyes) 2 fr. fr.; **Panzer** (Leupoldsdorf) 1 mk. g.; **Bärthel** (Buchholz) 0,70 mk. g.; **Evans** (Huyton) 2/- ŝil.; **Gineste** 3 fr. fr.; **Blanc** 3 fr. fr.; **Mailhac** 5 fr. fr.; **Diaz** 2 fr. fr. (ĉiuj en Cette). **Söderberg** (Norrahammar) 2 kr. sved.; D-ro **Nikolskij** (Kojdanovo) 2 mk. g. laŭ alvoko de Kirjuŝina, alvokas Kelman, Manusević, Kac kaj Margolin. **Povoroznik** (Bobrujsk) 1 rbl. laŭ alvoko de Kirjuŝin. **Aas** (Oslo) 3 kr. norveg. laŭ invito de Konovalov (Niĵni-Novgorod) kaj alvokas K-dojn Eilertsen (Oslo), Muribo (Galapagos) kaj Nikitin (Moskvo).

*

NIA POŜTO

Esperanto. — Alvenis viaj letero k. manuskripto. Aperos se estas loko. Viajn rekomendojn ni notis. — *E. L.*

W. B. (Dresden). — Via artikolo tute kontraŭas la celon de SAT k. eĉ tiun de la neŭtrala esperantismo. La ĝenerala alpreno de esp-o ankaŭ senlaborigus multe da laboruloj: tradukistoj, interpretistoj, kompostistoj k. a. — La laboristoj ne devas atendi, ke la mastroj konsentu propravole la mallongigon de la labordaŭro, sed organizite batali por trudi tiun plimallongigon: Unuvorte ili devas klasbatali. — Ne forgesu, ke la teknika progreso estas nehaltigebla. — *E. L.*

2081. — Tiajn "alvokojn" ni ne povas publikigi senpage. Organizoj kiuj volas uzi la servojn de SAT almenaŭ aliĝu kiel subtenantaj membroj. — *E. K.*

1786. — Tiajn anoncojn ni akceptas nur kontraŭ pago. — *Adm.*

[1]) Vidu n-on 100 de "S-ulo".

★ DIVERSAĴOJ ★

PER KELKAJ VORTOJ

* Centro de Laborista Esperantista Ligo en Ĉekoslovakio translokiĝis el Plzen, kie ĝi estis fondita, en la ĉefurbon Praha.

Nun Ligo komencos eldonadi sian monatan oficialan bultenon.

* Lab. Esp. Unuiĝo en Praha aranĝos dum Olimpiado por la alveturintaj Gek-doj, marde la 5. VII. 27 en sia ejo interamikiĝan vesperon kaj kunsidon de ĉiuj lab. esper. estantaj en Praha de la 6-a ĝis la 7-a h. vespere. Je la 8 h. ĝin postsekvos amuzvespero kun esp. programo (kantado, teatraĵo, ktp.). K-doj kiuj vizitos Olimpiadon, tuj post alveturo en Praha anoncu vin al deĵorantaj K-doj en la stacidomo. Se vi ne faros tiel, vi malfaciligos nian laboron kaj malutilos propagandon.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, k. ĉ. l. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernanta la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Aŭstrio.

K-do *E. Spangenberg*, Arbeitergasse 9, *Wiener-Neustadt*, dez. interŝ. PM, k. koresp. k. ĉ. l.

Belgio.

— Tramistoj Atentu! 45 tramistoj, lernantaj esp. dez. koresp. k. ĉiul. samprofesianoj. Adr.: K-do *J. Lebacq*, Esperanta Kurso, Maison Syndicale 17, Rue du Poinçon, *Bruxelles*.

Ĉekoslovakio.

K-do *Rudolf Pilz, Unter Maxdorf*, n-o 105, ap. Gablonz a. N., dez. koresp. k. ĉ. l. Gek-doj, L, PI.

K-do *Konrad Wallesch, Josefsthal, 149*, ap. Gablonz a. N., dez. koresp. k. ĉ. l., precipe kun Sovet-Unio, krom Germanio.

Germanio.

K-do *Herbert Horn*, Göppersdorfer Str. 8, *Burgstädt i. Sa.*, dez. koresp. pri ĉ. t. L, PK, PI, bfl. PM. k. ĉ. l. Rapide resp.

K-do *H. Bukreus*, Allersbergerstr. 119, *Nürnberg*, dez. koresp. L, PK, PI. k. ĉ. l. Resp. garantiata.

K-do *Gerhard Laneus*, Bahnhofstr. 56, *Trebbin, Kr. Teltov*, dez. interŝ. *nur* PM, marko kontraŭ marko.

Hungario.

— Komencantoj dez. koresp. precipe kun naturamikoj, sed ankaŭ k. a. Gek-doj. Adr.: *Johano Dncza*, Knézics Karoly-u. 13, *Eger*.

Rumanio.

K-do *Emanoil Catz*, str. St. Petru 23, *Braila*, dez. koresp. k. ĉ. l. PI, L.

Sovet-Unio.

K-do *A. P. Lanovenko*, Kaŝperovski saĥ. zavod, *P. O. Tetiev*, Kiev. gub., dez. koresp. k. ĉ. l. L, PK, PI. Resp. garantiata. Skribu multnombre!

K-do *Petro Gein*, 1-a Nikolska 18, N.-Tagil, Ural. obl., dez. koresp. k. ĉ. l. pri ĉ. t. Resp. garantiata.

K-dino *Bakulina*, dez. koresp. k. ĉ. l. pri bibliotekaj, industriaj, ekonomiaj ktp. temoj. Adr.: *Odessa*, Slobodka Slobodskaja ul. 56, 5-a Kaĵzavod (Leduzino).

K-do *Pravdin*, Sovetskaja 63, *Minsk*, (gvidanto de la faka "Laborista Vivo" en la gazeto "Zvezda"), dez. koresp. k. ĵurnalistoj. Materialo estos presata en la gazeto.

K-dinoj *Maria Dvorkina* k. *Berta Gordon*, Komunistiĉeskaja 20, kv. 6, *Minsk*, dez. koresp. k. ĉ. l. Resp. garantiata.

K-dinoj *Doha Blumberg* k. *Manjo Poznjak*, Krasnoznamennaja 15, kv. 1, *Minsk*, dez. koresp. p. ĉ. t. k. ĉ. l.

K-do *S. Motkin*, Pedteĥnikum, *P. O. Sobolevo-Vorobjovo*, Smolensk. gub., dez. koresp. kun ĉiul. lab-esp-istoj, precipe kun lernantoj, L, PK, PM.

— Kiu dez. koresp. pri div. diversaĵoj skribu al K-do *E. Ĉiĥaĉov*, Vasilevskaja, 33, I., *Kamenskoj*, Dnepr. okr.

K-do *N. Braginskij*, poŝtkesto, 4, *Kamenskoje*, Dnepr. okr., dez. koresp. pri ĉ. temoj k. ĉ. l. Resp. garantiata.

— *Muldistoj!* Skribu al K-do *E. Ĉiĥaĉov*, Vasilevskaja, 33, I., *Kamenskoje*, Dnepr. okr.

GEKAMARADOJ EN ĈIUJ LANDOJ!

La Leedsa (Anglio) SAT-grupo okazigos kunvenon — 9. julio 1927. Ĉeestos delegitoj el unuiĝoj, socialistpartioj, kooperativ-organizaĵoj, junularoj ktp. Ankaŭ estos esperanta ekspozicio. Bonvolu sendi salutleterojn, il. PK, gaz., ktp., por montri al Leedsa Proletaro, la neceson lerni esperanton, kiel ilo de tutmonda proletara solidareco. Sendu almenaŭ unu el ĉiu lando. Ni respondos al ĉiu, de kiu ni ricevos. Sendu al K-do **H. Burbey**, 30 Mason Street, Byron St., **Leeds** (Anglio)

Sekcio de Intern. Koresp.

ĉe Sebastopola SEU komit. kaj de gazeto "Majak Komuni" volas korespondi kun ĉl. labor. organiz. kaj individue ĉiuj leteroj estos nepre respond. kaj interesaj presotoj.

K-doj, skribu multnombre! Nia sukceso dependas de vi.

Sebastopol, str. de Trockij n-o 30, "Majak Komuni".

Ĉiuj Ateistoj

legu la ĵurnalon

LIBERPENSULO

Per abono de ĉi gazeto vi estas membro de la "Internacia Ligo de Liberpensuloj". Kotizo 2.— mk. g. aŭ sama valoro. Ĉiu novaliĝonto ricevas diversajn interesajn malnovajn numerojn senpage. Ĉiu membro rajtas publikigi trilinian anoncon jare, senpage. USSR-anoj mendu ĉe K-do Geo Teterin, Gubkom Esperantistov, Leningrad, Fontanka 21.

Adreso: **Kurt Hubricht, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22, I.**

Poŝtĉek-no. 43808.

SPORTULOJ TUTMONDAJ!

En Velten (Germ.) okazos la 9. kaj 10. julio 1927 granda laborista sportfesto. Por pruvi la taŭgecon de nia lingvo, ni petas ĉiujn sportemulojn k. sport-organizojn sendi al ni salutleterojn, bildojn de ekstergermanaj sportfestoj ktp. — H e l p u !

Adr.: *Arbeiter-Sportkartell*, Fr. Wendland, Friedrichstr. 27, *Velten b. Berlin* (Germanio).

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)